




Tion plej bone scias tiuj, kiuj faris eksperimentojn - t.e. provis vivi konforme al tiu aŭ alia ellegita teorio. En pli bona kazo rezultis banaleco. Do, eliro ne estas! Ĉu volas tion homo aŭ ne, frue aŭ malfrue, li devos agnoski maltaŭgon de ĉiaspecaj ŝablonoj kaj komenci krei mem. Kaj ĉu, après tout, tio estas tiom terura? Mankas ĝenerale devigaj opinioj - do ni elturnigu per nedevigaj. Suferos pro tio suferos nur instruistoj...

Elrusigis : Oksana

"LA FLORO DE L'NOKTO"

de irana poeto : **N. Nader-pur**
Tradukis elperse : Djavad Kamali
IRANO



*Kiam la lumo de l'luno
ekbrilis,
kiam la floro de l'stelo
kreskis,
kiam la brizo de l'salaj maroj
blankajn ŝaŭmojn de la akvoj
flaris;*

*Tiam vi sole revenas, sed nuda
certe parfumita
de laodoro de multaj floroj.*

Mi brakumas
vian mildan korpon,
kiel lito de l'nubo, la sunon.
Vi ekridas
kaj al mi kokete diras :
- Kiam ni, do, ambaŭ
pluki ĉi-stelojn povas?

Mi tuj rigardas
al senbrua ĉielo
kaj vi rigardas
mire al miaj okuloj.
Miaj palpebroj malleviĝas,
kiel viaj,
kiel flugiloj de du birdoj
en pluvaj noktoj.

Vi poste ridas
kaj remalfermas
viajn belajn lipetojn.
Kun vi vento ekĝemas sopire :
- Kiel estas silente jam ĉi-nokte!

Buligas subite de kisadoj
viaj dolĉaj lipetoj,
kiel la floro, de la vespa pikilo.
Ni sentas ambaŭ en niaj buŝoj
vinberan guston de l'pikaj kisoj.

Denove ekruĝiĝas
viaj mildaj lipetoj;
refoje ekfermiĝas
viaj fajraj okuloj
de l'bonĝuaj kisetoj.
Vi ridas kaj min diras deloge :
- Kiel estas silente jam ĉi-nokte!

Ĉe la aŭror'
kiam anasoj flugas al ĉielo
por kapti la luman stelon, de for,
sur lito de luntumaj sablitoj,
ili vidas nur unu
du kune tiujn ombrojn. . .